



62.

SVJETSKI KONGRES ESPERANTO - OMLADINE INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

p.p 452 , 71000 Sarajevo , tel/ fax +387 33 533 958
www.esperanto.ba , info@esperanto.ba

SARAJEVO INVITAS...

Vi certe jam scias ke la 62-a IJK okazos inter la 6-a kaj la 13-a de aŭgusto 2006 en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino.

Loka Kongresa Komitato elkore invitas junajn britajn esperantistojn partopreni tiun ĉi eventon.

Esperable multaj membroj de la brita movado, ne nur gejunuloj, rekonos la ŝancon viziti Sarajevo kaj samtempe partopreni IJK-n. Jen nova ebleco ĝui eksterordinaran kongresan etoson kaj profundigi bonajn rilatojn inter niaj movadoj.

La kunvivado de diversaj popoloj, religioj kaj kulturoj havas jam plurjarcentan tradicion en Sarajevo. Nek teruraj okazaĵoj dum lastaj dek jaroj malharmoniigis la urbon. En la nuntempa malfermiĝo kaj akceptado de tutmondaj normoj, pro sukcesa konservado de siaj kutimoj kaj la tradicia kunvivado de malsamaj religioj, kulturoj kaj etnoj, Sarajevo ŝajne estas la plej bona loko por diskuto pri la nuntempeco, la tutmondiĝo kaj la konservado de tradicioj, multkultureco kaj toleremo.

Grandaj olimpikaj montaroj, fonto de la rivero Bosno, neolitika trovejo Butmir, riĉa nokta, kultura kaj arta vivo, bonega gastronomia oferto – ĉio troveblas nur duonhoron for de la kongresejo.

Por akurataj informoj pri la aliĝreguloj kaj la kongrespreparoj, bonvolu viziti nian retpaĝaron:

www.esperanto.ba

Bonvenon en Sarajevo!

Prezidantino de Loka Kongresa Komitato
Vildana Delalić